

Historio de la volapuka movado

Johann Martin Schleyer (1831–1912) aperigis en 1879 sian lingvoprojekton Volapuko (*Volapük* ‘mondlingvo’). Okdek tri jarojn poste Johann Schmidt publikigis historion pri ties movado. Nun André Cherpillod eldonis tiun libron en Esperanto, tradukitan de Philippe Combot. Per tiu traduko ni povas do konatiĝi kun la organizaĵoj de tiu fascina antaŭiranto de Esperanto. (Vidu recenzon pri la gramatiko de Volapuko en *Monato*, septembro 1995, p. 23.)

La libro estas organizita laŭtempe, en ĉapitroj kiuj prezentas la nomojn de la kluboj kaj revuoj (tamen sen traduko). Tiel ni povas por ĉiu jaro vidi kiom da kluboj kaj kiom da revuoj ekzistis. Nur en 1889 ne malpli ol 40 kluboj estis fonditaj. Sed jam en 1891 la movado estis en stato de atendado: oni parolis pri kvar partioj inter la volapukistoj, sed verdire du volis krei tute aliajn lingvojn kaj tiel ne plu apartenis al la volapuka movado. Pri tia disfalo oni kompreneble scivolemas.

La sorto de la lingvo ĉefe dependis de du viroj, Schleyer kaj August Kerckhoffs (1835–1903 aŭ 1905), *datuval* ‘inventinta moŝto’ respektive *kademal* ‘akademia moŝto’ aŭ *dilekel* ‘direktoro’ de la *kadem* ‘akademio’. Estiĝis malamikeco inter la du, kaj Kerckhoffs ekŝiĝis el la akademio. La libreto donas mallongajn provojn de la origina Volapuko, la Volapuko de Kerckhoffs kaj la “nuna” Volapuko, t.e. tiu de Arie de Jong. Tamen mi kiel leganto soifas pri informoj rilate al la personaj kaj lingvaj flankoj de la disputo.

La libreto estas provizita per pluraj indeksoj: pri nomoj, gazetoj, libroj kaj lingvoj.

Christer KISELMAN

Johann Schmidt: *Historio de la universala lingvo Volapuko*. Tradukis el la volapuka originalo Philippe Combot. Eldonis André Cherpillod, Cougenard, 1996. 30 + XXII p. ISBN 2-906134-30-9. Prezo ĉe FEL: BEF, ĉe UEA: NLG.